

Pri la eldona aktivado de KLEG


Kiam Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj (KLEG) komencis sian agadon en 1951, ĝi samtempe komencis eldonadon de libroj. La unuaj estis porpacaj broŝuretoj kontraŭ milito kaj atom-bombo. Ĉar ankoraŭ estis ekonomie malfacila tempo post la milito, oni fondis kooperativon, Japana Esperanta Libro-kooperativo. Ĝi poste fariĝis eldona fako de KLEG, kiu preskaŭ ĉiujare konstante eldonas novajn librojn, jen lernolibron, jen facilan legaĵon, jen literaturaĵon, ktp.

Ni jene prezentas tiujn, kiujn oni nun povas aĉeti ĉe la libroservo de KLEG (prezo en japana eno). Bv. ankaŭ konsulti la retan katalogon de UEA.



Tradukitaj el la japana literaturo

- Postmilita japana antologio** 1500
Kolekto de 12 noveloj de elstaraj verkistoj: *Ooe Kenzaburō*, nobelpremiito, ka.
- Gooŝ, la ĉelisto** 1500
kolekto de fabeloj de *Miyazawa Kenzi*, trad. de *Nozima Yasutarō*.
- Nokto de la galaksia fervojo** 1400
- Kvar fabeloj de Miyazawa Kenzi** 1200
Ambaŭ estas kolektoj de fabeloj de *Miyazawa Kenzi*, trad. de *Konisi Gaku*.



- Vespera gruo** 300
Dramo de *Kinosita Zyunzi*, trad. de *Miyamoto Masao*.

- La 15a, marto, 1928** 500
Romano de *Kobayasi Takizi*, kontraŭreĝima verkisto, trad. de *Nukina Yositaka*.

Originalaj noveloj

- Vage tra la dimensioj** 700
Sciencfikcioj de *Konisi Gaku*.

Verkoj de Vasilij Eroŝenko

- Lumo kaj ombro** 500
Fabeloj kaj poemoj originale verkitaj en Ĉinio.
- La tundro ĝemas** 500
Rakontoj kaj poemoj originale verkitaj pri Siberiaj popoloj.
- La malvasta kaĝo** 500
Fabeloj tradukitaj el la japana.
- Stranga kato** 500
Fabeloj tradukitaj el la japana.
- La kruĉo da saĝeco** 800
Fabeloj originale verkitaj en Rusio.
- Cikatro de amo** 900
Fabeloj trad. el la ĉina traduko far *Lusin*.

Bildrakonto

- La Flambirdo** 1800
de *Tezuka Osamu*, trad. de *Konisi Gaku*.

Enigma

- Gimnastiko por cerbo** 400
50 matematikaj enigmoj kun solvoj.



Enigma (2)

TACUMI Hiroŝi

Kvin sinjoroj, nome *Abe, Egi, Ida, Oku* kaj *Uno*, apartenas al iu orkestro. Iliaj fakaj muzikiloj estas violono, harpo, fluto, korno kaj timpano. Tri el ili estas esperantistoj, dum la aliaj du ne. En la Universala Kongreso en Jokohamo tiuj tri esperantistoj volontule laboras pri akceptado, ĉiĉeronado kaj loĝigo respektive.

Surbaze de jenaj kvin informoj divenu, kiu sinjoro ludas kiun muzikilon, kaj kiu esperantisto volontulas en kiu laboro.

(1) El la 3 esperantistoj la plej nova estas tiu, kiu laboras pri loĝigo, kaj la dua nova estas tiu, kiu ludas fluton. La plej malnova estas s-ro *Ida*.

(2) S-ro *Oku* nun intencis eklerni Esperanton, instigita de la UK en Japanio. Pri tio li interkonsiliĝas kun tiu, kiu ludas harpon.

(3) La violonisto kaj tiu, kiu laboras pri loĝigo kune partoprenis en la lasta UK en Florenco.

(4) En la lasta jaro la timpanisto ĉeestis elementan kurson de Esperanto, kaj la antaŭlastan jaron s-ro *Uno*. Ili membriĝis al loka Esperanto-klubo tuj post la kurso, kaj decidis volontule labori en la UK en Jokohamo. Dume unu alia esperantisto estas membro de la klubo jam de antaŭ pli ol dek jaroj.

(5) El la 5 muzikistoj nur s-ro *Abe* kaj tiu, kiu laboras pri ĉiĉeronado, ankoraŭ ne havas sperton vojaĝi eksterlanden.



Verko por paco

Notoj pri la Delto 400
Travivaĝo de atombombita virino, trad. de *Konisi Gaku*.

Zamenhofaj

La revizoro 200
Paroladoj de d-ro L. L. Zamenhof 1000
Nova eldono kun suplemento
La gimnazio 700
Zamenhofa traduko kun japanlingva traduko.

Lerniloj por japanlingvanoj

Ekzercu vin en bazaj vortoj 1200
verk. de *Tani Hiroyuki*.

Esperanto tiel parolata 1000
verk. de *Huĝimoto Tacuo*.

Nova kurso de Esperanta Interparolo 1000
verk. de *Takeuti Yosikazu* kaj *Tani Hiroyuki*.

Facilaj legaĵoj

Ivan la malsaĝulo 900
Tradukita rakonto de *L. Tolstoj*.

50 Fabloj de Ezopo 800
Fabloj reverkitaj de *Nakagaki Kozirô*.

La krimo de Katrina 400

Vojaĝo kun Katrina. 500

Katrina malfruas 500
Rakontoj originale verkitaj de *Sten Johansson*.

